

SINPREZENTOJ DE LA KANDIDATOJ

Grégory DENIS

Ekde mia naskiĝo (1983), mi konas Greziljonon. En 2000 mi komencis ekkoni Esperanton per renkontoj aliloke ol en Baugé, kaj freŝdate mi komencis praktiki tiun lingvon en la klubo de Baugé.

En ĉi tiu kontinueco, mi partoprenis la kurson en aprilo. Ĝuinte la lokon kaj dezirante engaĝi min por promocii Esperanton, mi deziras integri la estontan komitaton.

Loĝante ĉe Baugé, mi povus helpi la administradon de la kastelo. Krome, mi planas malkovrigi tiun lokon al la loĝantoj de la regiono kaj precipe logi ilin lerni Esperanton.

Loke, mi prezidas asocion favore al ekologio. Per mia engaĝiĝo pri medi-protektado kaj per mia sperto, mi deziras vigligi tiun sektoron. Lige kun miaj pasioj, mi planas partopreni en la bontenado de la kastelo.

Fine, mi anoncas ligi min al la projekto « malfermo » ĉar ĝi ŝajnas kohera kaj mi fidus la opiniojn esprimatajn de la subskribintoj de tiu ĉi projekto.

Pierre SOUBOUROU « Ŝtonĉjo »

Mia kandidatiĝo estas daŭrigo de la projekto “Por la malfermo” de 2010 kaj de ĝia realigado pere de la projekto “mastrumado + kultur-ekspluatado” de 2012, inter kies efektividantoj mi estos. Krome, mi subtenas la “projekton por reorganizado”.

Mi naskiĝis la 22an de aprilo 1980, mi estas inĝeniero pri nuklea sekureco k media radioaktiveco, mi malkovris Esperanton kiam mi aĝis dek du, mi scipovas aliajn lingvojn k loĝis en pluraj landoj. Mi aktivus en diversaj fakoj: medi-protektado, best-rajtoj, veg(etar)anismo, laikeco, politiko.

Nun membro de SAT, SAT-Amikaro, TEVA, mi aktive partoprenas la vivon de Greziljono: rimedpersono, administra komisiono, laboraj semajnfinoj.

Mi deziras efektiviĝi la projekton pri mastrumado, por doni al la Kultur-domo financajn rimedojn cele al ĝia memstareco, renovigo de la Kastelo, plinombrigo de ĝiaj vizitantoj kaj pligrandigo de ĝia influo en Esperantio kaj dume inkludo en ĝian lokan kuntekston, disvolvante progresemajn projektojn.

Bert SCHUMANN

51-jara informadikisto el Rennes, germano kaj baldaŭ ankaŭ franco, esperantisto ekde 30 jaroj, E-lingva familio ekde 18 jaroj, KER-ekzameno C1, membro de UEA, UFE, SATam kaj EDE..

En Greziljono mi partoprenas laborsemajnfinojn ekde pli ol 10 jaroj, societaniĝis en 2003, komitata konsilisto ekde 6 jaroj, respondecas pri la interretejo (gresillon.org), varba dissendado kaj societana-listo, zorgas pri programorganizado, staĝestras ekde 2011.

Mi kandidatiĝas por plu apliki la projekton de 2010 « Por la malfermo... » kaj ĝian konkretiĝon de 2012 « projektaro de mastrumado + kultur-ekspluatado ». Mi subtenas la daŭrigan « projekton por reorganizado » kaj provas kunlabori laŭeble kun ĉiu. Greziljono restu sendependa kaj disponebla prioritare por E-aranĝoj. Greziljono funkcii laŭeble per volontuloj, sed ne hezitu pagi firmaojn por specifaj taskoj.

Post mia sperto pri organizado de 8 Infankongresetoj kaj 2 Renkontoj de E-Familioj (bertosch.free.fr), mi nun engaĝiĝas en Greziljono pri aranĝoj por infanoj, junuloj kaj familioj. Mi imagas "prilingvan infanferiaden" por infanoj ne-esp-istaj. Persone mi petas vian helpon por rekonstrui la belan ponton al la insulo.

François LO JACOMO

Lingvisto kaj matematikisto naskita en 1954-11-26, mi ekkonis Esperanton en 1971 kaj Greziljonon en 1972. Mi aktivis en diversaj asocioj Esperantistaj kaj ne Esperantistaj (Animath: www.animath.fr), sed pri la administrado de la kastelo mi ekzorgis nur en 2009, por kompensi la malplenon kaŭzitan de internaj konfliktoj. Tiam mi proponis « projekton pri reorganizo », kiun necesas daŭrigi, sed kiu tute ne malhelpas aliajn projektojn.

De post kiam mi iĝis prezidanto de la Administra Komitato (2010), la financa situacio pliboniĝis kaj ni regajnis fidon, sed mastrumado de la kastelo estas peza tasko kaj ni estas ankoraŭ tro malmultaj. Allogi aktivulojn, disvolvi la agadojn proponante, interalie, pli larĝan eblecon lui la kastelon, trovi financadon por renovigaj konstrulaboroj, daŭrigi juran reguligon : jen vasta programo por la venonta Administra Komitato, en kiu mi deziras partopreni.

Armelle PIOLAT

Esperantistino ekde 2000, 40-jara, konsultisto pri organizado, loĝanta en departemento Yvelines, estis aktiva membro de UFE kaj JEFO. Societano de Greziljono ekde 2001, mi partoprenis laborajn semajnfinojn, mi estas komitata konsilisto pri mastrumado ekde 2011. Ekzemple, mi redaktis «Gvidilon de la proceduroj pri funkciado de la kastelo» kaj respondecis pri la kuirejo dum la Jarfino 2010 kaj dum Festo en 2011.

Mi estas kandidato por daŭrigi la projekton « Por la malfermo...» de 2010, por konkretigi la nunan « projekton de mastrumado kaj kultur-ekspluatado » kaj por subteni « projekton por reorganizado ».

Mia celo estas disponigi miajn kompetentecojn pri organizado kaj asistado je la servo de la membroj, de la publiko kaj de dinamika teamo. Greziljono estas agrabla loko, kiun mi deziras partigi kun plej multe da homoj.

Ronan LE CORRE

(sinprezento ricevita la 13an de junio 2012)

Mia kandidatiĝo enskribiĝas en la daŭrigo de projekto 'Malfermo' de 2010, kaj ĝia konkretigo per projekto 'Mastrumado + Agrikultura Ekspluatado'. Plie, mi subtenas la 'Reorganiz-Projekton'.

Naskita la 10an de februaro 1974, kuiristo, mi malkovris esperanton pasintjare dum staĝo pere de asocio Animath, por kiu mi preparis la manĝojn. De dudeko da jaroj mi aktivas en pluraj medioj: senrajta loĝado (memmastruma politiko); vegetarismo; kontraŭatoma (éco-warrior en Bure); bestrajtoj (ALF); ekologio (Earth-First).

Tiu ĉi projekto enskribiĝas en la daŭrigo de mia aktivado kaj malfermiĝo je aliuloj. Nuntempe mi partoprenas en la vivo de Greziljono dum la malfermperiodoj, preparante la manĝojn.

Mi deziras ekfunkciigi mastrum-projekton por doni monliberecon al la Kulturdomo: renovigi la kastelon; kaj pliigi ĝian uzatecon kaj ĝian malfermecon je la loka vivo; tamen konservante sendependan mastrumadon kaj kontrolrajton je komunaj projektoj. Mi deziras ke ĉi tiuj projektoj estu vektoroj por ĝia memmastrumado pere de aktivaĵoj rilatigitaj kun la esperanta 'filozofio'.